nia voĉo

madrida esperanto-liceo majo 2016

## TURISMA PROMENADO

La sabaton, 16-an de aprilo, la instruisto kaj lernantoj de la nuna esperanta kurso en la sidejo de MEL, organizis anstataŭe kunan promenadon tra la centro de Madrid, en ekskurso bildigita per historiaj kaj anekdotaj klarigoj kiujn pretigis Águeda Biurrun. Kompreneble, esperante.

Malgraŭ la pluva tago, aro da esperantistoj trairis la stratojn de nia urbo sed ĉi-foje gvidataj de Águeda, kiu montris al ili kuriozajn kaj nekonatajn angulojn de Madrido.

## DEKLAMADOJ OKAZE DE LA TAGO DE LA LIBRO

Kiel ni anoncis en pasinta numero, okaze de la celebrado de la Internacia tago de la Libro, la madridaj esperantistoj partoprenis aktivaĵojn organizitajn de eksteraj institucioj kaj grupoj.


Kiel jam tradicie, dum tiu semajnfino okazis la publika legado de DonkiĤoto en kultur-institucio Círculo de Bellas Artes. Ankaŭ esperantistoj partoprenis, la sabaton 23-an de aprilo je la 6a vespere, per laŭtlegado de kelkaj paragrafoj de la verko en Esperanto. Ĉijare nin reprezentis Toño del Barrio kaj Águeda Biurrun.

La 24-an de aprilo, ene de granda kulturfesto en la kvartalo San Fermín, la kvartala asocio programis publikan deklamadon de poemoj en Esperanto, en granda malferma spaco kie oni antaŭvidas ke estos konstruita longtempe sopirata publika biblioteko. Jam dum pasinta jaro okazis kunlaboro de esperantistoj, kaj ĉijare oni denove invitis nin por la Tago de la Libro. En tiu ĉi jaro, oni profitis la aperon en januaro de la libro "Nova mondo en niaj koroj", antologio de hispana nuntempa soci-kritika poezio, en traduko al Esperanto de la poeto Miguel Fernández, per la deklamado de poemoj de tiu libro, dulingve. Krom Miguel Fernández kaj Jorge Camacho, ĉeestis la kompilinto Alberto García-Teresa kaj du el la antologiitoj, María Ángeles Maeso kaj Antonio Crespo Massieu, kiuj tiamaniere manifestis sian apogon al Esperanto kaj al la konstruo de la menciita biblioteko.



## LIBROJ VENDATAJ ĈE MEL

Ni volas memorigi ke Madrida Esperanto-Liceo disponas je kelkaj libroj por vendi, ĉefe por homoj kiuj deziras lerni Esperanton aŭ plibonigi sian konon de la lingvo.




En la apuda foto vi povas vidi la ĉefajn librojn vendatajn de la Liceo, kaj en la retejo de Hispana Esperanto-Federacio http://www.esperanto.es/hef/index.php/servoj/libroservo, vi povas legi pri aliaj disponeblaj en la sidejo, kaj pri la proceduro por ilin aĉeti.

Ni informas ankaŭ ke la libro "Bohemiaj lumoj", eldonita de MEL, estis represita, post elĉerpo de antaŭa eldono, kaj estas denove disponebla en la sidejo kaj en ĉefaj libroservoj.

## EL MADRIDO AL HERRERA DEL DUQUE

Ni rememorigas ke depost la 29a de junio komenciĝos en Herrera del Duque (Badajoz) unue Seminario por Aktivula Maturiĝo kaj depost la 30a ni ĝuos la 75an Hispanan Kongreson de Esperanto, ĝis la 4a de julio. Kiel antaŭkongresa aperitivo, la 28an de junio, mardo, en Madrido okazos la "Tria Bohemia Nokto", literatura programero surbaze de la itinero trairita de Makso Stelo kaj S-ro Latino de Hispalis, la protagonistoj de "Bohemiaj lumoj".

Estas nun organizataj du postaj komunaj vojaĝoj al Herrera. La unua ekiros la 29an junio je la 8:00 matene por tiuj kiuj partoprenos en la AMo-seminario, kaj la dua la 30an junio je la 15:00 por ĉiuj aliaj. Oni planas lui du busojn por la partoprenantoj (ĝi kostos proksimume po 15 € /individuo), sed se ne ekzistas sufiĉa mendado pri unu el ili, oni organizos komunan vojaĝon per privataj aŭtoj de kongresanoj. Kontaktu la organizantojn ĉe kongreso@esperanto.es se vi interesiĝas pri tiuj alternativoj.

Speciale oni faras alvokon al la madridanoj planantaj utiligi propran aŭton, por ke ili informu pri tio, cele al komuna organizado de la vojaĝo (ĉefe por la mateno de la 29a de junio)

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazos ĉiulunde post la 18,30.

La maja sabata babilado okazos la 7-an de majo. Atentu forumojn kaj sociajn retojn por koni la detalojn pri loko kaj horo, depende de la vetero.

Por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com